

Pacpremio 2001 por profesoro *Habermas*

La filozofa kaj sociologo *Jürgen Habermas* elektiĝis por la Pacpremio de la Germana Libromarkato* 2001. Argumento por tiu alta distingo de la Borsa Asocio de Germanujo** estis, ke *Habermas* revokadis en la memoron liberecon kaj justecon, kiuj ja reprezentas la nekontesteblan kernon de demokrata komunumo. La 71-jarulo estas rigardata la plej notinda germana filozofa de la nuntempo. En la 80aj jaroj, *Habermas* provokis la "historiistan disputon" per sia kritiko de la tezoj de historiisto *Ernst Nolte* pri naziismo.

Kio estas "Pacpremio de la Germana Librokomerco"?

La ekde 1959 atribuita pacpremio de la Germana Librokomerco estas unu el la plej gravaj distingoj en Germanujo kaj estas aljuĝita por la jaro 2000 la 51an fojon al literatura eminentulo. Per la premio estas laŭdata elstarulo enlanda aŭ eksterlanda, kiu - precipe sur la kampo de literaturo, scienco kaj arto - kontribuis al efektivigo de la paco.

Disdonita estas la kun 12500 eŭroj dotita distingo ĉiun jaron dum la ekspozicio de Germana Librokomerco, t.e. la profesia organizo de la eldonejoj kaj librovendejoj en Germanujo. La loko de la solena premio ĉiam estas la Sanktapaŭla katedralo en Frankfurto ĉe Majno, la iama kunvenloko de la Frankfurta Nacia Asembleo en 1848.

Ekde 1959 estas honoritaj ĉirkaŭ 50 verkistoj, filozofoj, sciencistoj kaj politikistoj per tiu ĉi pacpremio, inter ili kiel plej elstaraj laŭreatoj ekz. *Albert Schweitzer* (1951), *Hermann Hesse* (1955), *Carl-Friedrich von Weizsäcker* (1963), *Astrid Lindgren* (1978), *Yehudi Menuhin* (1979) kaj *Václav Havel* (1989).

Ekde 1990 estas premiitaj *Karl Dedecius* (1990), *György Konrad* (1991), *Amos Oz* (1992), *Friedrich Schorlemmer* (1993), *Jorge Semprun* (1994), *Annemarie Schimmel* (1995), *Mario Vargas Llosa* (1996), *Yasar Kemal* (1997) kaj *Martin Walser* (1998). Ties parolado post ricevo de la premio en la *St. Paul*-katedralo kaŭzis la *Walser/Bubis*-vortbatalon pri la traktado de la holokaŭsto. En la jaro 1999 la usona historiisto *Fritz Stern* gajnis la alte ŝatatan premion, dum la pacpremio 2000 estis atribuita al la alĝeria verkistino *Assia Djebar* je la 22a de oktobro 2000 en la Frankfurta Sanktapaŭlkatedralo por ŝia literatura engaĝo por interna paco en ŝia hejmlando kaj la interkompreno inter la diversaj kulturoj.

(Fonto: *dpa* en *Werra Rundschau* 2001-06-08)

* *Friedenspreis des Deutschen Buchhandels*; ** *Deutscher Börsenverein*

Komenco de nociosistemigo ĉe fervojo

H. HOFFMANN

Enkonduko

Fervoja faklingvo estas tre multspeca. Internacia Fervojunio, franclingve *Union Internationale des Chemins de Fer* (UIC) kun sia sidejo en Parizo dividis ĝin en 15 fakojn kaj 101 subfakojn. La faklingvo unuigas ĉefe ĝenerallingvajjn, teknikajn kaj jurajn enhavojn. En la jaro 1957, UIC eldonis Leksikonon ĝeneralan de fervojaj terminoj (franclingve: *Lexique général des termes ferroviaires*) kun preskaŭ 9000 fakesprimoj en la 5 lingvoj: franca, germana, angla, itala kaj hispana. La lasta (4-a) eldono enhavas la nederlandan kiel sesan lingvon.

Problemoj de fervoja faklingvo

La enkonduke menciita fervoja terminaro tute ne enhavas difinojn, tamen baziĝas sole sur nociosistemoj kaj vortoj de la franca faklingvo, iam kvazaŭ internacia lingvo ĉe fervojoj. Traduki tiujn terminojn en aliajn lingvojn ne eblas kontentige, ĉar en unuopaj lingvoj la realo estas multkaze diversnacie dividata.

En la fervoja faklingvo ne okazis internacia normigo de nocioj, kiel ekz. en natursciencoj (*Arntz & Picht*, 1995). Eĉ interne de naciaj faklingvoj normigo estas mankhava, precipe pro ofte tuja, spontanea kaj arbitra nomdono al inventaĵo aŭ nova evoluigaĵo, ankaŭ pro sinonima ĥaoso, sen konsideri nociosistemojn (*Blanke*, 1995). Ekster tiuj objektivaj problemoj ekzistas subjektivaj mistradukoj, ĉar ne ĉiu tradukisto estas sufiĉe profunda fakulo por scii sen aldonita difino pri ĉiu detalo en la koncerna subfako - kaj en fontolingvo kaj en celolingvo. Sekve tradukaj terminaroj parte pretekstas per terminaj ekvacioj tutan nocian konformecon malgraŭ naciaj diferencoj (*Budin & Felber*, 1989). Do ankaŭ Fervoja Terminaro en Esperanto el la jaro 1989, en kiu troviĝas ĉiuj nocioj de la seslingva UIC-leksikono kvazaŭ kiel sepa lingvo, enhavas tiajn malĝustaĵojn.